★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Spiroĥetoj

Spiroĥetoj estas bakterioj, kies ĉeloj aspektas kiel longaj, maldikaj spiraloj. Ili estas moviĝemaj, flekseblaj, ne toleras oksigenon kaj en malbonaj kondiĉoj kreas sporojn. Same kiel aliaj bakterioj plimulto da spiroĥetoj troviĝas en naturaj ekosistemoj kaj homojn kaj bestojn ne endanĝerigas, sed multenombraj reprezentantoj de la genroj Borrelia, Brachyspira, Leptospira kaj Treponema apartenas al signifaj kaŭzantoj de malsanoj. En vivcikloj de patogenaj spiroĥetoj ofte partumas transmitantoj (akaroj, insektoj) kaj ronĝuloj (ratoj, musoj). En atakitaj organismoj la spiroĥetoj kaŝas sin en ĉeloj, por ke evitu imunecajn sistemojn kaj protektu sin kontraŭ antibiotikoj kaj aliaj medikamentoj. Spiroĥetaj atakoj estas insidemaj, ĉar inkubaciaj tempoj de la malsanoj estas longtempaj, simptomoj neklaraj kaj diagnozoj ofte malfacilaj. Malbonaj higienaj kondiĉoj, mizero, militaj suferoj, naturkatastrofoj (inundoj) kaj riskema seksa konduto kontribuas al disvastiĝo de infektaj malsanoj, kiuj eĉ en la 21a jarcento endanĝerigas homojn kaj bestojn.

**Lingvo:** Esperanto

**Prelegonto:** Oldřich Arnošt Fischer

**Kiam:** la 22an de januaro 2025 je la 18.00-a h (la klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

La renkontiĝo estos registrata.

★

## Ni rekomendas

- La 5an — 13an de julio 2025 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (Kaunas, Litovio)
- Kaj precipe ni rekomendas UK 2025, kiu okazos en Brno.

★

## Cetera programo en januaro

La 29-an **Promeno tra Brno** – Milan Kolka, tradukekzercado, rete per Skajpo

## Programo en februaro

La 5-an *Ankoraŭ ne agordita* – klubejo
La 12-an **Sidejo de Silezia Parlamento** – Ewa Caban, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice, rete per Zoom
La 19-an **Jarkunveno de membroj**, klubejo
La 26-an **Promeno tra Brno** II – Milan Kolka, tradukekzercado, rete per Skajpo

Mi petas vin, ke vi jam primensu programon por februaro kaj marto. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Koran dankon.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)